Marie Hankel,

# La simbolo de l´ amo

Rozujo sovaĝa, simbolo de l´ amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Mallaŭte tre dolĉa voĉeto elsonas:
Silentu, silentu, mi dormon bezonas,
Min nutras denove patrino la tero,
Pacience atendas mi ĝis la somero.

Dormantan rozujon printempo vekigis,
Somero ĝin riĉe kaj bele florigis.
Ho, donu al mi nun kroneton belfloran.
Girlandon balancan kaj brilekoloran!

Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian
Mi pikos, mi vundos la manon, la vian,
Pro amo mi miajn floretojn defendos,
Pro amo mi miajn pikilojn forsendos.

Al vento ĝi florofoliojn oferis,
Aŭtune la fruktoj fiere aperis:
Rozujo, simbolo de l´ amo vi restas,
Pacienca, alloga, kuraĝa vi estas.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Marie Hankel *(nask. Dippe, ∗1844-02-02 – †1929-12-15).*

*Arg-274-554 (2005-02-01 12:14:49)*